

& Al la ĝojo:

< Rekante 17 el 33 batoj por strofo, entute 759 paŝoj dum 9 minutoj. Verkis Friedrich Schiller. El germana tradukis Kálmán Kalocsay (Norda Prismo, 58/2, paĝoj 65-66, 1958). Komponis Ludwig van Beethoven (9-a simfonio, 1824). Baladigis Martin Strid (2016) per divido na strofoj, strofigo na ĥoraĵoj, revicigo na ties lastaj versoj, elekto na rekantaĵo kaj enmeto na unu plia taktero.>

(#Melodio:

<:33> (/mimi faso sofa mire; dodo remi mire re; mimi faso sofa mire; dodo remi redo do; (#Rekantaĵe: rere mido reemilfa mido; reemilfa mire dore So o; mimi faso sofa milre; dodo remi redo dodo))×5)+

(&Strofoj:

'1 /Ĝoj! Fajrero belradia! ; Elizea di-filin! ; fajrebrie ni al via ; templo iras, preĝi vin.

(×: **Kiel sur la pompa2j vojoj ; suno2j sur la firmament'** ; ; gaje marŝu, frata ge2nt' ; ; kiel venki la herooj!)

'2 Ĉesu, de vi sorĉligate ; de l' rigora mod' la ŝir' ; ĉiuj homoj sentas frate ; se vi ŝirmas per flugil'.

'3 Jen brakumoj al milmiloj ; Jen ĉi kis' al tuta mond'! ; Loĝas patro por ni, filoj! ; Fratoj! super stela rond'.

'4 Se la granda ĵet' bontrafis ; kaj amikon gajnis vi ; se virina am' vin ravis ; Vin enmiksu kun ĝojkri!

'5 Jes, se eĉ nur unu koro ; estas via en la mond'! ; Kaj se ne – do vin kun ploro ; ŝtelu for el nia mond'.

'6 Ĉiu sub ĉielo glata ; donu sin al simpati'. ; Kie tronas Nekonata ; al la steloj gvidas ĝi.

'7 Ĉiu sur la brust' Natura ; suĉas sukron de la ĝoj' ; kor' malbona, koro pura ; sekvas ŝin laŭ roza voj'.

'8 Ŝi vinberojn, kisojn donas ; kaj amikon sen pridub' ; en volupt' la vermo dronas ; vidas Dion la kerub'.

'9 Ĉu genuas vi, milmiloj? ; Vi kreinton sentas, mond'? ; Loĝas Li trans astro-briloj! ; Serĉu super stela rond'.

'10 En eterno de l' Naturo ; Ĝojo estas la risort'. ; En la mondhorloĝ' por kuro ; radojn pelas ŝia fort'.

'11 Ŝi el ĝerموj logas berojn ; sunojn regas ŝia gvid' ; Ŝi tra l' spaco rulas sferojn ; trans la astronoma vid'.

'12 Esploriston ŝi alridas ; el la fajrspegul' de l' Ver' ; sur krutaĵ' de l' Virto gvidas ; ŝi la homon de toler' ,

'13 sur Kred-Monto sunobrila ; flirtas ŝia flag' el or' ; ŝin tra l' fendo ĉerk-kovrila ; vidas ni en anĝel-ĥor'.

'14 Ho toleron, paciencon ; fratoj, por pli bona mond'! ; Granda Dio rekompencan ; donos super stela rond'!

'15 Ĉu pripagi diojn? Vanto! ; Ĉu simili? Bela pen'! ; Venu ĝoji kun ĝojanto ; la mizero, la ĉagren'.

'16 Venĝo? Koloro? En forgeson! ; Jen pardon' al malamik'! ; Liaj larmoj havu ĉeson ; lin ne boru pento-pik'.

'17 En ŝuldlibroj plu nenio! ; Mondon regu harmoni'! ; Tiel juĝos pri vi Dio ; Fratoj! kiel juĝis vi.

'18 Ĝojo ŝaŭmas en pokaloj ; en orsango de l' vinber' ; mildon trinkas kanibaloj ; heroecon malesper'.

'19 Se rondiras la botelo ; fratoj, saltu el la sid' ; ŝprucu ŝaŭmo al ĉielo ; Jen ĉi glas' , por Bon-Spirit'!

'20 Himnas Lin abismo stela ; sera far' kun glora cit'. ; Supre, trans la tend' ĉiela ; Jen ĉi glas' por Bon-Spirit'!

'21 En suferoj: firma forto ; al senhelpaj: ŝirma brust' ; eternec' al ĵura vorto ; eĉ al malamiko: just'.

'22 Virfiero kontraŭ tronoj ; kvankam sangon kostu spit' ; al merito estu kronoj ; kaj pereon al insid'!

'23 Fermu vin en sankta rondo ; Ĵuru do kun glaso-lev' ; je l' Reganto de l' Stel-Mondo ; pri l' fidelo al la Dev'!